

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2009 numero 3-a: julio-oktobro
dissendo je la 15-a de aŭgusto



Fotis Claude Gacond

El Schynige Platte rigardo al la valo de Grindelwald.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils
14, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32

ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2009-4 : novembro-decembro :
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2010-1 : januaro-marto :
januare 10, dissendo 1-an de februaro.

2010-2 : aprilo-junio :
aprile 10, dissendo 1-an de majo.

2010 3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel. : 076 261 06 09.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto, Esperanto-
Servo, PF 262, 4132 Muttenz 1. Tel.: 076 460
89 92. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Nelida Weidmann_González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2009-3 - Redakto kaj fotoj: Stefano Keller

Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo okazinta la 16-an de majo 2009, en CDELI, Biblioteko de la Urbo, La Chaux-de-Fonds



Estraro de SES (de maldekstre):

Hans-Werner Grossmann, Mireille Grosjean, Dietrich Weidmann, Nelida Weidmann, Stefano Keller

Ĉeestas: 33 personoj.

Dietrich Weidmann anoncas la senkulpiĝojn: *Ernst Glättli, Wolfram Fischer, Gesinjoroj Bartoli. Jaqueline Vasserot* senkulpigas *Lucienne Dovat, Nicole Margot* faras same por *Alain Favre*.

Stefano Keller resumas la staton de la membraro, laŭ la jarraporto.

Nicole Margot informas, ke ankaŭ *Marguerite Jaccard-Besson* forpasis dum 2008. *Mireille Grosjean* klarigas, ke SES ne ricevis informon pri tio, kaj tial ŝia nomo ne estis menciita inter la forpasintoj.

La tagordo estas aprobata. Voĉnombranto ne estas elektita, oni nombras la sindetenojn kaj la kontraŭstarojn, la ceteraj personoj estas konsiderataj aprobantoj de la voĉdonata punkto.

Bruno Graf atentigas, ke ne estas mencio en la tagordo pri elekto de nova revizoro. La *estraro* respondas, ke tiu temo estos traktata sub punkto 11: « Eblaj pliaj elektoj »
- *La protokolo de la ĜK 2008 estas unuanime aprobata.*

Estrara raporto

Stefano Keller resume raportas pri la organizado kaj okazo de la evento *Simpozio pri lingvaj rajtoj ĉe UN* en Ĝenevo, menciante la partoprenon de du signifaj lingvistoj: *Tove Skutnabb-Kangas* kaj *François Grin*.

Mireille Grosjean dankas la aktivulojn de SES ĉe UN en Ĝenevo kaj substrekas la signifon de tiu kunlaboro inter UEA kaj SES pro la ekzisto de la UN-oficejo en Ĝenevo.

Stefano Keller dankas al *Nicole Margot* kaj *Nancy Fontannaz* pro ilia kunlaboro, kiuj (krom aliaj kunagantoj, respondeculoj de UEA) deĵoras por helpi la intervenantojn ĉe UN en ilia tekstoprilaborado.

Dietrich Weidmann mencias la eventon *SFERO (Svisa Familia Esperanta Renkontiĝo)* okazinta en Sangernboden (BE), kiel entuziasmiga okazaĵo por familioj esperantistaj de Svislando. **Nelida**

Weidmann prezentas la organizadon de la venonta renkonto SFERO <http://www.esperanto.ch/sfero/>

Mireille Grosjean parolas pri la memortago pri la forpasinta *Claude Piron*, kio okazis kun grandnombra partoprenantaro. Sekve, **Marie-Louise Münger** detale raportas pri la evento. Krom tiu en CDELI, ankaŭ en Ĝenevo okazis memorkunveno.

Informado: **Mireille Grosjean** informadas 3-foje jare pri Esperanto sendante dokumentojn al ĵurnalistoj, politikistoj kaj aliaj kontaktpersonoj, 140 adresoj entute. Depost sia vojaĝo en Afriko, **Mireille Grosjean** helpas la Afrikan Komisionon de UEA per informado ankaŭ en landoj de tiu kontinento.

Rimarko pri la junularo fare de **Dieter Rooke**: nenio estas skribita pri junulara agado en la jarraporto. **Dietrich Weidmann** klarigas, ke nenio okazis en 2008 organizita de junuloj, ĉar nuntempe mankas aktivuloj el tiu aĝgrupo. Ni esperas baldaŭan aperon (post 2-4 jaroj) de junaj aktivuloj, kiuj nuntempe kreskas en esperantaj familioj.

- *La jarraporto de 2008 estas unuanime akceptita.*

Financa raporto 2008

Hans-Werner Grossmann, nia kasisto, ne ricevis demandojn pri la jarkalkulo. **Bruno Graf** (la kaskontrolanto kun **Dieter Rooke**) raportas pri la ĝusteco de la

jarkalkulo. Ili kontrolis ankaŭ la financon raporton pri la enciklopediaj elspezoj kaj trovis ĝin en ordo.

- *La financa raporto de 2008 estis unuanime akceptita.*

Konkurso Esperanto

Mireille Grosjean rememorigas pri la konkurso de la grupo La Stelo, Ĝenevo. La ĉi-jara konkurso de SES esence baziĝas sur la spertoj de la ĝeneva konkurso. La aĝlimoj estas pli larĝaj por ebligi la partoprenon ankaŭ al pli junaj kandidatoj.

Dietrich Weidmann klarigas, ke SES disponas pri 8'000 frankoj por la konkurso. Krom aperigo de malgranda pagita anonco en ĵurnalo senpaga, nia varbado okazos ĉefe rete www.esperanto-konkurso.ch.

Dietrich Weidmann kaj *Stefano Keller* petas la kunlaboron de la membraro en la informado pri la konkurso. Ili informas pri la uzo de la buĝetita sumo, el kio estos pagataj ne nur la anonco kaj la ne tre altaj monpremioj, sed ankaŭ la tutsemajna restado en la Novjara Renkontiĝo en Germanio (vojaĝo inkluzive).

Nicole Margot demandas, ĉu la mallonga tempo por la studado sufiĉos. *Mireille Grosjean* respondas, ke ankaŭ en la konkurso de La Stelo estis ĉirkaŭ same 3-4 monatoj je dispono kaj tio sufiĉis.

- *La buĝeto estas unuanime akceptita.*

Alelekto de Nelida Weidmann al la estraro de SES

Stefano Keller prezentas la proponon de la estraro alelekti *Nelidan Weidmann*. *Bruno Graf* mencias kritikon prononcita fare de membroj de SES rilate al alelekto de familiano de alia estrarano. Li substrekas, ke kvankam la svisa leĝo ne malebligas tion, tamen povas okazi problemoj, se en estraro sidas pli ol unu membro de la sama familio. Kiel ekzemplo, li menciis la kazon de la geedza paro *Perla Martinelli* kaj *Giorgio Silfer*. Li tamen agnoskas, ke nun temas pri alia situacio kaj ĝenerale estas malfacile trovi kunlaborantojn.

Stefano Keller substrekas en sia respondo, ke tiam temis pri alia situacio. *Nelida Weidmann* aldonas, ke ŝi deziras ĉiukaze aktive kontribui al la vivo de SES per zorgado pri familiaj aranĝoj, sendepende de sia alelekto.

- *Nelida Weidmann estas unuanime alelektita kiel estrarano de SES.*

Mireille Grosjean anoncas precizigon pri onidiroj, tekstoj, kiujn eble iuj povis aŭdi aŭ legi ie pri ŝia demisio: tio estis nur klaĉoj, miskomprenoj. Nun ŝi revenis el vojaĝo kaj kun granda ĝojo plue kunlaboras por SES.

Stefano Keller atentigas pri erara aperigo de telefonnumeroj en SES informas 2009/2: lia numero estis

skribita ankaŭ ĉe la nomo de *Mireille Grosjean*. Ŝia numero estas 032 932 18 88, tiu de *Stefano* estas 076 261 06 09.

Eblaj pliaj elektoj

La unujara deĵorperiodo de *Bruno Graf* kiel revizoro finiĝis, *Dieter Rooke* plue plenumos tiun taskon. Nova kandidato estas *Barbara*

Pochanke. Ŝi estas unuanime akceptita.

Proponoj ne alvenis.

Diversaĵoj: ne estas pliaj temoj.

Per tio la kunveno estas fermita.

Protokolis:

Stefano Keller

sekretario de SES

Donacoj ricevitaj dum aprilo kaj majo 2009

S-ro David Buhlmann, Prilly (30) - S-ino Monique Fiaux, Chamblon (5) - S-ino Lucienne Dovat, Renens (100) - S-ro Hans Meier, Basel (15) - S-ino Ruth van Puijenbroek, Winterthur (5) - S-ro André Sandoz, La Chaux-de-Fonds (100). Entute: CHF 255. Al la enciklopedia konto alvenis donaco de 250.- frankoj de Konrad Rey, Luzern. *Grandan dankon al la malavaraj subtenantoj de SES!*

Kunlaboro kun AGROSCOPE Changins-Wädenswil *Mireille Grosjean*

AGROSCOPE estas federa oficejo, do laborejo gvidata de la Konfederacio. Estas du oficejoj, en Changins en kantono Vaŭdo kaj en Wädenswil en kantono Zuriko.

En junio 2008 kunlaboranto de Agroscope ekrilatis kun SES estraro, petante tradukon de informilo pri danĝera planto, *Ambrosio*. Mi tuj respondis, ke mi povos traduki tion en aŭgusto. Li konsentis. Mi faris. Poste aperis papera dokumento pri tiu planto en Esperanto kun multaj fotoj kaj ankaŭ la dokumento aperas sur la retejo de Agroscope.

Temas pri planto, kiu venas el Ameriko kaj nun etendiĝas al la tuta mondo. Ĝi kaŭzas spirproblemojn. Oni devas elŝiri la plantojn, protektante sin per gantoj kaj masko, kaj poste bruligi ilin.

Sed mi faris plian paŝon: mi proponis al tiu kunlaboranto, ke mi klopodu ricevi tradukojn en aliaj lingvoj. Tion mi sukcesis: mi povis liveri al Agroscope tekstojn en la rusa, en la ukraina kaj en la vjetnama.

Tio estas tre efika laboro utila kaj pozitiva per Esperanto.



***Vendredon, 16-an de oktobro 2009
(alveno je la 11-a horo),
ĝis dimanĉo, la 18-an de oktobro 2009,
en Centro por kursoj kaj sportoj
LENK en SIMMENTAL***

Post sukceso de la lasta SFERO 2008, ni decidis reokazigi ĝin en 2009. Tiufoje en la centro por kursoj kaj sportoj LENK en SIMMENTAL. Nia celo estas doni la eblon al esperantistoj kaj ne-esperantistoj kunvivi la esperantan etoson kaj montri, ke ankaŭ en Svislando Esperanto estas vivanta lingvo.

Tiu-ĉi renkontiĝo ne estas nur por familioj, sed ankaŭ estas malfermita al ĉiu, kiu interesiĝas pri Esperanto kaj ties kulturo.

Bonvolu aliĝi plej eble rapide. Restas nur malmultaj liberaj lokoj, ĉar ni jam havas multajn aliĝojn (restas lokoj nur en plurlitaj ĉambroj, sed eventuale eblas trovi lokon alie, plikoste)!

Aliĝo eblas rete, sub <http://esperanto.ch/sfero/> - telefone (dum oficejhoroj): +41(0)44 251 50 25.

Vi ankaŭ povas poŝte sendi la aldonitan aliĝilon al:
Neldia Weidmann, Archstrasse 2, CH-8610 Zuriko

Prezoj:

Partopreno de la tuta renkontiĝo en 16-lita ĉambro kostas por gejunuloj: Fr 112.-, por plenkreskuloj: Fr 140.- kio inkluzivas tranokton kaj ĉiujn manĝojn, do estas tre favora prezo! (Pri la ceteraj prezoj informiĝu en la retejo.)

Atentu:

Por gejunuloj el la regiono Zuriko, Esperanto-Societo Zuriko subvencias la partoprenon per pago de la duono de ilia kotizo.

Novaj patronoj de SES, 2009

S-ino Maria Dolores Benvenuti, Chavannes-près-Renens - Ges-roj Tazio k Teresita Carlevaro, Bellinzona - Ges-roj Gabriel k Verena Chaves-Walder, Flawil - S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz - S-ro Gilbert Darbellay, Morrens - S-ro Luciano Ortelli, Luzern - S-ro François Huguenin, La Chaux-de-Fonds - Ges-roj André k Marianne Rochat, Grandvaux - S-ro Armin Weidmann, Uerikon.

Kontakto-peto el Kongo

SES ricevis (2009/6/27) retan kontaktopeton el Kongo. Interesiĝantoj bonvolu skribi al Masemi Nelly, nelly_masemi@yahoo.fr:

« Saluton gesinjoroj, mi legis pri via esperanto-societo. Mi interesiĝas pri la konkurso de junuloj. Mi volas havi amikojn aŭ korespondantojn ĉe vi. Mi loĝas en Kinshasa. Mia nomo estas MASEMI MBEMBI NELLY, mi ankaŭ estas lernantino tie ĉi. Bonvolu akcepti mian demandon. Dankon. Amike, Nelly »



Ĝenerala Kunveno de SES kun valora kaj konvinka kultura programo. CDELI, 16-05-2009 Stefano Keller

Eventoriĉa kaj multflanka estis nia tago ĉe CDELI, sabaton, la 16-an de majo 2009. Varia programo estis pretigita fare de la aktivuloj de la Centro, sub la sperta gvidado de la ĉeforganizanto, Claude Gacond.

La malferma programero estis la fonda kunsido de la Esperanto-Amikaro de CDELI. Per tiu evento oficialiĝis do la ekzisto de la esperanta fako de la Asocio de la Amikoj de CDELI (Association des Amis du CDELI, kio oficiale ekekestis la antaŭan posttagmezon). Raporton pri tiuj kunvenoj vi povas legi en alia artikolo de tiu ĉi bulteno.

Esperanto

Asembleo de Svísa Esperanto Societo
kaj Kultura Programo

11h30-13.00 & 14h30-16h00
Salle Charles Humbert, 1^o etaĝo

Kunveno de la Esperanto-Fako de la Amikaro de CDELI
Kafumo, libro-servo, necesejo
CDELI, 2^o etaĝo
10h00 - 17h30

La Koruso de Etoy (aŭ *Svisa Koruso*) prezentis diversajn tradiciajn, renesancajn kaj popolajn kantojn el Svislando, Francio kaj Finnlando, sub la gvido de Elisabeth de Mestral:



Atentema spektantaro - kiu tiam konsistis jam ankaŭ el la alvenintaj gepatroj de la ĉeestanta lernantaro de la loka privata lernejo *La Granda Ursino* - ĝuis pri la diversaj prezentaĵoj de la plenkreskuloj kaj poste de la infanoj. La lernantoj de la Granda Ursino kun plezuro rakontis en esperanto pri amuzaj eventoj el sia lerneja vivo. Tiel la ĉeestantoj povis aŭdi kaj vidi plian ekzemplon konvinkan, demonstradon de la vivanta internacia lingvo.




La spektaklo samtempe alportis respondon al la demando de SES-anoj pri la junulara agado. La gelernantoj de tiu lernejo, kune kun la aliaj infanoj kreskantaj en esperantistaj familioj, estas la garantio pri la kontinueco de la esperanta

movado en Svislando. La lokaj grupoj povus informadi pri la ekzisto kaj pri la esperantaj aktivecoj de la lernejo, La Granda Ursino de La Chaux-de-Fonds.



Fine de sia teatraĵo, la gelernantoj kantis: « Jen nia mondo »

La kultura programo finiĝis per la prelego de Benno Frauchiger, kiu rakontis pri la aventuroj, kiujn li travivis dum sia bicikla vojaĝo ĝis Aŭstralio:



Esperanto-Konkurso de SES, 2009

Por disponigi iom pli da tempo kaj ebloj al la varbado, la estraro decidis modifi la aliĝan datlimon por la kandidatoj de la konkurso. La nova aliĝdato estas la 20-a de julio 2009.

Intertempe jam okazis kelkaj informadoj: en Laŭzano (kiel oni povas vidi sur ĉi tiuj bildoj), en Les Brenets, Le Locle, La Chaux-de-Fonds kaj Neŭŝatelo. En Zuriko tio okazos ĉefe kadre de publike registrata radioelsendo.

Krom tiuj regionoj, nur el Bazelo ni ricevis kunlaborproponon en la informado pri la konkurso. Bedaŭrinde ĝis fine de junio neniu alia loka grupo (aŭ individuo) proponis sian kunlaboron petante kvanton da flugfolioj de la konkurso.



www.concours-esperanto.ch | www.esperanto-wettbewerb.ch

Tutsvisa aktiveco

Atentigo pri tri gravaj sabataj renkontoj okazontaj en CDELI, La Chaux-de-Fonds

Dum la feria periodo ne okazis studaranĝoj en CDELI, sed jam en aŭgusto interesa renkonto kun Mireille Grosjean, kiu raportos pri siaj vojaĝoj en Afriko, instigu al ĉeesto. Tutcerte tiu aranĝo estos same interesa, kiel ŝia junia raporto pri ŝia restado en Japanio, kiu prave entuziasmigis dudekon da partoprenantoj.

La festo celebronta la cent-kvindekan naskiĝan jubileon de L. L. Zamenhof ne okazos la 5-an de septembro, kiel anoncite en nia pasinta bulteno, **sed la sabaton 7-an de novembro**. Tiu renkonto kun koncerto kaj prelegoj atestu pri la dinamismo kultura de la svisa esperanto-komunumo kaj digne manifestu nian fieron aparteni al humanisma movado supernacia, kiu nelacigeble daŭrigas la aktivecon lingvo-pacigan, kiun en 1887 iniciatis Doktoro Esperanto.

Flugfolio aldonita al nia bulteno ebligu al la esperanto-klubo instigi siajn membrojn viziti la efikajn trinivelajn studsabatojn, kiuj regule disvolviĝas en CDELI, organizante eĉ pergrupan partoprenon.

Kaj la seminario pri paco okazonta la 3an de oktobro ankaŭ tutcerte indos je ĉeesto.

Jen detalaj informoj pri tiuj renkontoj organizitaj de CDELI sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo, UEA kaj Svisa ILEI-Sekcio.

-oOo-

Mia vojaĝo en Benino

Mireille Grosjean

Sabaton 22an de aŭgusto

Mireille Grosjean rakontos pri siaj du restadoj en Benino. Ŝi estos ĵus reveninta el Afriko kaj havos multajn fotojn pri siaj kontaktoj kun afrikaj esperantistoj. Kaj ŝi proponos interesan ekzercon pri la lingvo kiswahili.

Horaro :

10.00 : Malfermo de la CDELI salono kun eblo aĉeti librojn, babiloj kaj kafumi.

10.30 : Unua prelega momento: Benino, la lando, geografio kaj historio.

11.15 : Kafuma paŭzo.

11.45 : Dua prelega momento: ILEI-Konferenco en Porto Novo en aŭgusto 2008 kaj Ĉu UK en Afriko?

12.30 : Komuna tagmanĝo.

14.30 : Tria prelega momento: Problemoj al afrikanoj por rilati kun Eŭropo.

15.15 : Paŭzo

15.30 : Kvara prelega momento: Afrikanoj kaj mi.

16.15 : Konkluda teumo kaj amika babilado, libroservo.

17.30 : Oficiala fermo.

(Monkolekto por la kovrado de la organizaj kostoj.)

-oOo-

Seminario pri paco

Mario Bélisle & Mireille Grosjean

Sabaton 3an de oktobro

Horaro :

10.00 : Malfermo de la CDELI salono kun eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

Matene ekde la 10.30 kun Mario Bélisle pri la temo « La longdaŭra paco-atestado de la svisaj kvakeroj. Multaj esperantistoj, inter ili Edmond Privat, estis kvakeroj. Estas bona okazo por la esperantistoj rememori aŭ malkovri la kvakerajn aspektojn al pacemo.

12.30 : Komuna tagmanĝo.

Posttagmeze ekde la 14.30 kun Mireille Grosjean pri la temoj :

Pacedukado kiel studenta fako.

Pacedukado kiel enhava konstanto en klaso kaj grupo.

Dek jaroj da instruado de konflikto-solvado.

Instruprogramo celanta edukadon al paco.

Spertoj pri rolludoj en paroligaj rondoj en Japanio.

Aktivecoj de kelkaj konindaj asocioj :

° Ecole Instrument de Paix (EIP) [Lernejo Ilo al Paco]

° Communication non-violente (CNV) [Senperforta komunikado laŭ Marshall Rosenberg]

° Association Suisse des Educateurs à la Paix (ASEPAIX) [Svisa Asocio de Edukistoj Pacen]

° Alvoko al Mondpaco (AMO)

Mireille Grosjean tiel difinas sian nunan kaj estontan taskon : Subteno de la geinstruistoj per pretigado de instrumaterialo, de lingve miksitaj grupoj al etne miksitaj grupoj. Kunlaboro kun Edukado.net.

16.15 : Konkluda teumo kaj amika babilado, libroservo.

17.30 : Oficiala fermo.

(Monkolekto por la kovrado de la organizaj kostoj.)

-oOo-

Kultura Festo

koncerto, recitoj kaj prelegoj

honore al L. L. Zamenhof naskiĝinta antaŭ 150 jaroj

Sabaton 7an de novembro

CDELI - Biblioteko de la Urbo - La Chaux-de-Fonds, Progrès 33

Programo :

10.00 : Malfermo de la salono de CDELI kun eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

11.00 : Malfermo de la Aŭlo.

11.30 : **Koncerta recitalo de Elisabeth de Mestral, soprano, kun la pianisto Wolfram Fischer. Poemtradukoj de Dominique de Mestral.**

Tiuj tri romandaj kaj alemana esperantistoj kunlaboras por malkovrigi al la publiko kantojn el la repertuaro de la francaj melodioj, kies komponistoj vivis en la tempo de L.-L. Zamenhof (fino de la 19a kaj komenco de la 20a jarcentoj).

Elisabeth de Mestral komencis kanti en eklezia koruso kaj studis pianon kaj poste kantadon ĉe la Muziklernejo de Montreux. Paralele al sia komerca studado ŝi daŭrigis sian primuzikan fakiĝon en la profesiaj klasoj de la Ĝeneva Muziklernejo. Ŝi estris la koruson *la Caecilia* en Montreux et perfektigis sekvante staĝojn pri malnova muziko en Francio kaj pri *Lieder*-kantado en Vieno (Aŭstrio). Ŝi soliste kantas dungita de korusaj koncertoj aŭ de orkestroj en preĝejoj kaj muzikaj festoj. En 2007 ŝi kreis la *Svisan Koruson*.

Wolfram Fischer studis pianon en alemana Svislando dum deko da jaroj. Paralele li profesiiĝis komputistike. Ekde pli ol 20 jaroj li plenumas la funkcion de orgenisto akompananta korusojn kaj muzikistojn.

Dominique de Mestral, la tradukisto de la kantotaj poemoj, efektivigis beletrajn, prilingvajn kaj primuzikajn studojn, kiuj vekis en li viglan intereson al la lingvoj latina, greka, franca, germana, angla, rusa kaj itala, kaj nun esperanta. Esperantigoj de poemoj estas por li aktiveco riĉiga kaj ludkaraktera.

Jen eroj el la programo

disdonota kun la tekstoj al la koncertpartoprenantoj :

Claude Debussy	Beau Soir – <i>Bela vespero</i> , poemo de Paul Bourget
Gabriel Fauré	Au bord de l'eau – <i>Apud rivero</i> , poemo de Sully Prud'homme
Francis Poulenc	C – <i>Se</i> , poemo de Louis Aragon
	Les Chemins de l'Amour – <i>La vojoj de l' amo</i> , poemo de Jean Anouilh
	3 eroj el Courte Paille, poemoj de Maurice Carême
Léo Delibes	Les Filles de Cadix – <i>La Knabinoj de Kadiks'</i> , poemo de Alfred de Musset
Charles Gounod	Sérénade – <i>Serenado</i> , poemo de Victor Hugo

Ô ma belle rebelle – *Belulin' daŭre nea*, poemo de Jean-Antoine de Baïf
André Massager J'ai 2 amants – *Mi havas 2 amantojn*, teksto de Sacha Guitry
Emmanuel Chabrier Ballade des gros dindons – *Balado de la dikaj meleagroj*, poemo de Edmond Rostand.

13.00 : Komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14.30 : En la Aŭlo : **Prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof**, kiu konsistos el tri eroj :

1.Ruslando je la zamenhofa epoko.

2.Esperanto en la cara Ruslando.

3.Esperanto en Sovetio.

Sébastien Moret estas kunlaboranto en la Sekcio pri Slavaj lingvoj ĉe la Laŭzana Universitato, kie troviĝas rondo de esploristoj pri la prilingva historio en Centra kaj Orienta Eŭropo. Kadre de tiu fako li interalie efektivas esplorojn pri interlingvistiko kaj pri esperanto en Sovetio kaj pri la historio kaj epistemologio de la artefaritaj lingvoj ĝenerale.

15.15 : Paŭzo.

15.30 : **Premiado** de partoprenintoj al la Kultura Seminario.

Kaj sub la gvido de **Claude Gacond**, laŭtleĝo, fare de esperantistoj el ĉiuj esperanto-grupoj, de **citaĵoj el paroladoj kaj verkoj de L.-L. Zamenhof**. Ili reliefigos la originalecon kaj daŭran aktualecon de la iniciatinto de esperanto.

16.15 : En la CDELI-salono : **Konkluda teumo** kaj amika babilado, libroservo.

17.30 : **Oficiala fermo.**

(Por la kovrado de la organizaj kostoj estos petita partoprenkotizo de fr 10.-)

-oOo-

CDELI

**Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

claude.gacond@ne.ch,
martine.schneller@ne.ch,
nancy.fontannaz@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn :
septembre 26, oktobre 24, novembre 21 kaj decembre 12 :

interaktiva zamenhofa festo. La detala informilo franc- kaj german-lingva, kiu akompanas nian bultenon *SES informas*, alportas ĉiujn utilajn klarigojn. Ĝi devus instigi la organizon de karavanaj grupaj partoprenoj al tiuj efikaj stud-sabatoj kaj la diskonigon de tiu perfektiga stud-eblo en ĉiuj esperanto-kursoj.

Amikaro de CDELI

La fondaj kunsidoj de la 15 kaj 16-aj de majo, kiuj grupigis tridekon da partoprenantoj, akceptis la statut-projekton de la asocio kun kelkaj ŝanĝoj kaj submetis ĝin al la direkto de la Biblioteko por definitiva akcepto, kaj elektis komitaton de 12 membroj, kies buroo konsistas el la prezidanto Claude Gacond, vic-prezidanto Martine Schneller, sekretario Nancy Fontannaz kaj kasisto Sonia Béatrix-Koleva. La protokolo de ambaŭ kunsidoj estos dissendita al la kotizintaj Amikoj de CDELI, antaŭ ol esti pli vaste diskonigita tra la kanalo de la nun redaktata retejo cdeli-org.



Fotis Nancy Fontannaz

Luc Allemand disdonas la statut-projekton al la partoprenantoj de la kunveno de la 16a de majo.

KCE

Kultura Centro Esperantista
Esperanto-Domo, Strato Postiers 27,
Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
Tel. & fakso: 032 926 74 07.
esperantio.net

Simpozio pri Homaranismo 17-21 aŭgusto 2009 en la Esperanto-Domo

Programo

Lundon la 17an, post la inaŭguro, prelegos François Degoul (prezidanto de SIZ) pri "Homaranismo 1914-1917"; posttagmeze skribaj komunikoj kaj prelego de prof. Christer Kiselman (universitato de Upsalo), pri "La filozofia kaj religia idearo de Zamenhof, kaj la roloj de lingvoj en ĝi".


Mardon la 18an prelegos Giorgio Silfer (universitato de Torino), pri "De 1901 al 2001: la homaranismo de Zamenhof, la sennaciismo de Lanti, la spirita sinkretismo de Privat, la raŭmismo de la Esperanta Civito"; posttagmeze prelegos Perla Martinelli (prezidanto de la Esperanta PEN), pri "Intercionismo kaj homaranismo: Edmond Privat kaj la palestina demando". Sekvos vizito en la loka sinagogo.

Merkredon la 19an prelegos Walter Zelazny (universitato de Krakovo), pri "Verki biografion pri la homarano numero unu"; sekvos komunikoj de s-ro Armando Zecchin (fakulo pri teologiaj temoj) pri la rilatoj inter homaranismo kaj

romkatolikismo. Posttagmeze okazos duontaga ekskurso.

Jaŭdon la 20an matene skribaj komunikoj kaj prelego de Paolo Penacchio (fakulo pri politika historio) pri "Mazzini, Garibaldi kaj Zamenhof"; posttagmeze prelegos prof. Davive Astori (universitato de Parmo) pri "Homaranismo kaj Interna Ideo inter la hebrea kaj framasona tradicioj" aŭ pri "Internacia komunikado kaj libera penso: esperanto inter lingvistika kaj religia planado". Sekvos vizito en la loka framasona loĝio.

Vendredon la 21an matene forumo kun la partopreno de ĉiuj prelegintoj, pri "Kulturi homaranismon: per kiuj iniciatoj kaj per kies rimedoj?", sub la prezido de Bertil Nilsson. Libera posttagmeza programo.



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la keĵo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

Venontaj kunvenoj

Septembre 24: Ĉiu parolas pri siaj ferioj.

Dum la vesperoj KCE proponos kinotekon, kun filmoj en rilato kun homaranismo kaj la hebrea demando.

KCE peras la mendojn de tranoktejoj kaj akceptas la antaŭpagojn por la manĝoj (en la najbara licea restoracio). La programkotizo mem estas 100.- svisaj frankoj aŭ 70.- eŭroj (kun indicita rabato por tiuj, kiuj havas la esperantan civitanecon).

Komuna vespermanĝo

La duan mardon (aŭ jaŭdon) de ĉiu monato okazas en la Esperanto-Domo komuna vespermanĝo kun libera konversacio pri la novaĵoj en la esperanto-kulturo, sub la nomo "**verda mardo**".

-oOo-

Oktobre 22: Legado – legaĵoj.

Novembre 26: Venonta programo.

Decembre: Zamenhofa festo.

Morto

La 27an de junio 2009 forpasis sinjorino Berthe Spalinger.

-oOo-

Les Brenets

La 17-an de junio 50 personoj ĉeestis konferencon pri Japanio de Mireille Grosjean

Mireille Grosjean pensis, ke inter la loĝantoj de ŝia vilaĝo eble homoj ŝatos aŭskulti pri ŝiaj spertoj en Japanio kaj vidi fotojn. Konsekvence ŝi luis la spektaklo-halon. Ŝi pagis malgrandan anoncon en la loka ĵurnalo *L'Impartial*, kies redakcio aldonis artikoleon pri ŝia prelego du tagojn antaŭ la merkredo 17a de junio kun ŝia foto. Ŝi metis kelkajn afiŝojn en Les Brenets, Le Locle kaj La Chaux-de-Fonds *LE JAPON AU QUOTIDIEN* [ĉiutaga Japanio].

Kun amikino ŝi ordigis la salonon kun 50 seĝoj. Ŝi metis kelkajn japanajn objektojn sur tablon kiel ekspozicion. Ŝi havis siajn komputilon kaj projekciilon. Venis same multe da personoj, kiel estis da seĝoj: homoj el la vilaĝo, amikoj, kolego de aikido, iama lernantino kaj nekonataj personoj vidintaj la anoncojn.

Ŝi prezentis 80 fotojn pri Japanio aŭtune, vintre kaj printempe, pri kastelo, ĝardeno, templo, pri la indiĝena popolo ainu en Hokkaido kaj pri modernaj urbegoj po dek. Poste venis la granda parto de la prelego: Japanajoj de artoj al necesejo en alfabeto vico! Fine venis filmeto pri Monto Fuji.

Ĉiuj kontentis plintimiĝi kun la japana kulturo. Tion atestas la monokolekto alportinta sumon, kiu egalas la luprezon de la salono. Ŝi menciis, ke ŝi loĝis ĉe 22 familioj, kiuj, krom unu, parolas en esperanto.

Mireille Grosjean jam prezentis tiun prelegon pri Japanio en Shawinigan (Kebekio), en Herzberg (Germanio), en Lyon (Francio), en Ĝenevo kaj en La Chaux-de-Fonds ĉe CDELI la 27-an de junio. Ŝi prezentos ĝin en Les Bois JU en septembro, en Parizo en novembro kaj en Le Locle en decembro.

Per tiu ĉi prelega aktiveco ŝi ne nur tre objektive informadas pri la kultura kaj familia vivo en Japanio, sed ankaŭ pri la grava rolo, kiun esperanto ludis por ŝiaj kontaktoj kun la japanoj. Kaj tio vekas simpaton al nia lingvo.

Claude Gacond


-oOo-

La Chaux-de-Fonds

La gelernantoj de la privata lernejo *La Grande Ourse* (La Granda Ursino) studas esperanton ekde la unua elementa klaso, kaj okaze de esperanto-manifestacio en La Chaux-de-Fonds ili jam plurfoje prezentis spektaklon, kiel ĵus okazis la 16-an de majo kadre de la Ĝenerala Kunveno de SES. Ĉifoje ili rakontis pri sia lerneja vivo per pentraĵoj kaj spritaj rakontoj, kiujn ni publikigas.

Saluton!

Kiel vi jam certe vidis en la programo, ni estas gelernantoj de la lernejo La Granda Ursino. Ĉu vi aŭdis jam pri ĝi? Ĝi estas en Svislando, en la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝi estas normala lernejo, kiel ĉiuj aliaj, sed ĝi tamen estas diversa ol la aliaj. Ni multe cerbumis, kion prezenti al vi, kaj finfine ni pensis, kial ne rakonti al vi iomete pri nia lernejo en Esperanto? Ni pentris por vi bildojn, kaj rakontos historietojn per "Kamishibai", kiu estas japan-devena bildoteatro. Jen ĝi!



La lernojaron ni komencas per marŝkampadumo por pli bone interkonatiĝi kun la novaj lernantoj kaj ni marŝas dum kvin tagoj. Antaŭ du jaroj la merkredon ni alvenis al la monto Chasseral kaj pluvegis tre forte. Estis pene marŝi kaj estis ankaŭ malvarme. Ni decidis ripozi kaj revarmiĝi en la restoracio de Chasseral. Bedaŭrinde ĝi estis fermita pro la malbona vetero. Finfine Anke telefonis al iu buskompanio, kiu portis nin al nia tiutaga tranoktejo.



Tiun jaron ni marŝis interalie tra la montopintoj de Chasseral kaj ankaŭ Tête-de-Ran. La vetero vere ne dorlotis nin, sed anstataŭ grumblado, ni - Ailèn, Lucie kaj Manon - komponis kanton, kiun ni kantis al la tuta grupo la lastan tagon antaŭ la adiaŭo:

Kanto laŭ la muziko de "Unu sola vivo" de Gérald de Palmas/

Kia kampadumo, pluvego kaj inund'

La plandoj surtere kaj la moralo for. Oh...

R.: Vespere ni mortadas, kaj la bovin' ... pssst!

Hundoj bojas nin, kaj la bovin' ... pssst!

Matene rekomenco, ho somera kampadumo.

La vestaĵ' malpezas, la botelo same


La pied' kompotas, sed halti estas malpermesit'. Oh...

R.: Vespere ni mortadas, kaj la bovin' ... pssst!

Hundoj bojas nin, kaj la bovin' ... pssst!
Matene rekomenco, ho somera kampadumo.

Marŝi sur la pintoj, eĉ kun la tempesto
Oh la lernejo, sed ĉiam kun rideto. Oh...

R.: Vespere ni mortadas, kaj la bovin' ... pssst!
Hundoj bojas nin, kaj la bovin' ... pssst!
Matene rekomenco, ho somera kampadumo.



Dum nia laboro ofte okazas, ke ĉiuj studas sian propran temon. Tiu studado ĝenerale finiĝas per prelego. En tiu prelego ni prezentas al la aliaj kion ni vidis, spertis, legis. Dum mia prelego mi parolis pri la narvalo. Mi klarigis, ke la narvalo estas granda delfeno kun korno de unukornulo. Tiu korno estas ebura dento. Inter la aliaj prelegoj temis ankaŭ pri hundo, pri ĉevaloj, pri gumo kaj kraĵonoj, pri bonbonoj, ktp...



Foje iun pluvan tagon ĉiuj ludis futbalon dum la paŭzo kaj venis la ideo organizi turniron. Ni formis teamojn, kaj eĉ niaj instruistinoj partoprenis ĝin. Unu teamo devis gajni tri foje por la kvalifiko. En la lasta matĉo teamo de knabinoj ludis kontraŭ knaba teamo. Finfine ĉiuj gajnis pro la partopreno en la ludo.




Ĉe ni du-foje semajne estas la gelernantoj kiuj kuiras por tiuj, kiuj manĝas tagmeze en la lernejo. Ni havas kelkajn amuzajn kuirejajn historiojn, kiel tiu ĉi: Estis la dua fojo, ke Gaëtan preparis manĝaĵon en la lernejo. Li volis fari simplan kukon, nenio estas pli facila ol tio, tamen li sukcesis erari. Anstataŭ meti kvar foje la saman kvanton de la ingrediencoj, li metis la buteron kaj la ovojn por dek-du personoj, sed la farunon kaj la sukeron nur por kvar personoj. La rezulto estis iu spongeca, tre tre grasa kuko.


Alia kuka historio estis, kiam la kuiristo panike vokis Anke, dirante ke la kuko estas en la forno jam de du horoj, sed ankoraŭ daŭre faras blub-blub-blub! Efektive ĝi tion faris. Nu jes, estas iom da diferenco inter du litroj da lakto kaj du decilitroj da lakto... Bonŝance tiaj misaventuroj okazas nur tre malofte, tiel ni nur ridetas pri ili. Ĝenerale ĉio pasas bone, kaj la manĝaĵoj estas tre bongustaj.



En vintro kiam ni havas abundan neĝon, ni organizas sporttagojn ĉiun duan semajnon. Ni iras skii kaj neĝtabuli al «La Vue-des-Alpes». La ski-vojoj tie ne estas tre malfacilaj, do ankaŭ la komencantoj povas amuziĝi kaj progresi. La progresantoj ofte konstruas saltilon. Kun la neĝtabulantoj ni saltas sur tiu ĝibo kaj surteriĝas en la polvneĝon. Mi havas la senton flugi. Estas tre amuze.




Nia skikampadumo kutime estas en Arolla. Tie estas du sinsekvaj skiliftoj, kiuj portas nin tute supren. Louis, la ski-instruisto diris al ni subeniri. Ni subeniris, sed ne nur ĝis la meza lifto, sed ĝis tute suben. Louis serĉis nin je la meza halto, sed ne trovis. Li pensis, ke ni reiris supren. Sed ni perdiĝis iomete. Ni multe pripensis, ĉu ni reiru supren aŭ atendu sube dum Louis serĉas nin supre. Ni estis kvar: Hugo, Sacha, Malou kaj mi Sami. Finfine ni restis sube kaj atendis lin. Daŭris iom da tempo ĝis lia alveno, kaj li estis tre kolera. Kaj li pravis, ni povintus perdiĝi. Ups!




Niaj kampadumoj normale pasas bone, senakcidente. Dum la skikampadumo de dumil-ok (2008) mi, Félix havis la malbonŝancon havi nian solan akcidenton. Estis ĵaŭdo, ni amuziĝis salti sur monteto kaj Monika fotis nin. Mi estis sur mia neĝtabulo, iris tre rapide kaj abrupte falegis. Venis sekuristoj kiuj suben-portis min. Mi rompis mian brakon. En la hospitalo oni metis ĝin en gipson. Post du semajnoj mi denove falis kaj rompis mian gipson. Mi iris en la hospitalon por

reparigi ĝin. Oni rigardis ĝin per radiografio kaj vidis, ke mia radiuso delokiĝis. Oni devis operacii min por meti metalpecon en mian brakon. Ne estis tre amuze.



Dum la vintro ni amuziĝas ofte ekstere. Ni konstruas fortikaĵojn kaj poste ni formas grupojn. Post kiam la fortikaĵoj estas bone faritaj, ni organizas neĝbul-batalon kontraŭ la aliaj grupoj. Estas tre bonege. Kelkfoje ni brue disputas, sed ne estas tre grave. En tiuj okazoj ni decidis pri reguloj kaj ne plu estas disputo. Ĉi-jare ni tre longe povis ludi tiun ludon.



Mi alvenis en la lernejon antaŭ nelonge. Tuj en la unuaj semajnoj mi sukcesis fari ion, kio ne estas permesata. Temas pri la spigusoj. Ĉu vi scias, kio estas spigusoj? Malgranda paperpeco, kiun oni ĵetas per kaŭĉuka ringo. Do, mi ĵetis unu tian spiguson sur Jonathan, kaj mi diris:

- Ho, pardonu min, mi volis ĵeti ĝin sur Quentin!

Jonathan iris al Monika kaj diris al ŝi kio okazis al li, kion mi faris. Bonŝance Monika kaj Anke ne koleriĝis, kvankam ili povintus. Kaj estis tre bone ankaŭ tio, ke nek Jonathan, nek Quentin koleris kontraŭ mi.



Dum la malferma tago de nia lernejo, ni organizas ĉiam maratonojn por finance helpi vivi nian lernejon. Pasintjare pluvis la tutan tagon, kaj eĉ tiel ni devis kuri dum kvardek-kvin minutoj. Post kvin minutoj ni estis tre tre tre malsekaj. Sed finfine estis amuze, kaj ni tre bone kuris. Ĉi-jare ni kuris pasintsabate, kaj la tradicia pluvo estis for. Ni havis tre belan veteron kaj tre belan tagon. Venu foje viziti nin dum tiu tago!




Ĉi-jare nia ĉefa temo estas la nutrado. Kadre de tiu temo ĉiuj havis iun manĝaĵon por studi. Jonathan kaj mi, Anthony havis la buteron kiel temon, do ni fabrikis ni mem ĝin. Esther havis

la maizon kaj ŝi faris krevitajn maizojn, la tiel nomatajn «pop-korn». Sed ŝi estas ankoraŭ tro malgranda, do por ke ŝi povu rigardi en la kaserolon, ni donis al ŝi tabureton. Dum tiu tempo la aliaj faris panon el terpomo, karamelon, kaj aliajn bonaĵojn. Ĉio pasis bone, nur Sacha tranĉis iomete sian fingron.



Antaŭ du jaroj dum iu sporttago ni iris al Neuchâtel por sketi laŭ la bordo de la lago kaj poste baniĝi en ĝi. Kun Sami, Lucie, Manon kaj Jonathan ni amuziĝis puŝante unu la alian en la akvon. Tiam venis al mi la ideo puŝi en la lagon Anke, kiu sunbaniĝis sur sia tuko. Ni diskrete iris al ŝi, kaptis ŝin je la brakoj kaj la piedoj kaj ni ĵetis ŝin en la akvon. Monika eternigis nian ŝercon per sia digitala fotilo. Anke ridis kaj diris «Haltu! Haltu!» Do, ni lasis ŝin en la akvo. Ni ĉiuj tre bone ridis.



En junio ni estas for de la lernejo por unu semajno. Dum tiu semajno ni multe sportas kaj preparas nian jarfinan spektaklon. Ĝenerale ni iras al la farm-domo en La Cernie, kie oni ĉiam tre bonkore akceptas nin. Tie ni kuiras ĉiutage sur bivakfajro kaj nokte dormas en la fojno. Unu nokton ni havis la viziton de unu de la farmdomaj katoj, kaj ĝi forte ronkis. Ailèn forpuŝis ĝin, sed la kato ĉiam revenis sur ŝin. Ailèn vere volis dormi, do ŝi ĵetis la katon iomete pli forte, kaj ĝi alvenis ĝis la muro. Ups! Anke grumblis, ke ni tro bruas. Sed ne estis ni, estis la kato, kiu post du minutoj denove estis inter ni! Ni bone amuziĝis.



Ĉiujare por fini la lernejaron ni prezentas spektaklon. Pasintjare nia grupo kreis historion en kiu du infanoj reiris en la tempo per enorma ventilatoro. Ili ekvojaĝis pro la eraro de la inventisto, kiu malbone kunigis la kablojn. Unue ili iris en Egipton. Ili estis surprizitaj kaj ankaŭ tre timis. Ili vidis piramidojn kaj la filinon de la faraono. Dum tiu tempo la inventistoj ne kredis al siaj okuloj, ke la

maŝino malaperis, kaj ankaŭ ili tre timis. La maŝino iris ankaŭ ĉe la grekoj, kaj ili vidis la Grandan Aleksandron. Poste ili revenis, la maŝino ekmalfunkciis kaj finfine eksplodis. BUMM!

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“
Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1
Tel. : 022 771 24 37
La kunvenoj okazas en Maison des
Associations, rue des Savoises 15.

Raportoj

Rememoro pri Claude Piron

La kunsido de la 7-a de aprilo en la Domo de la Asocioj estis dediĉita al rememoro pri Claude Piron. Eĉ de malproksime venis la partoprenantoj al tiu kunsido de la ĝeneva grupo La Stelo por elvoki lia memoron. Multa emocio, kompreneble, ĉar Claude Piron estis centra piliero de la societo dum jardekoj. Dum lia vivo ĉiuj ja konsciis pri la graveco de lia ĉeesto. Lia forpaso plifortigis tiun certecon.

Kun la lerta stilo kaj la tiel melodia esperanto, kiuj ŝin karakterizas, Anita Altherr revivigis Claude Piron per multaj diapozitivoj. Tiuj fotoj klarigis lian vojon tra la esperanta mondo, unue kiam li estis ankoraŭ juna viro, poste kiel plenkreskulo kaj fine kun blankaj haroj. Bela perspektivo, kiu ebligis mezuri la distancon iritan, la aventuron, kiu estis lia vivo, kaj la gravecon de liaj verkoj.

La dua parto de la prezentado fokusiĝis je la lingva alporto de

Claude Piron. Konstruita sur ekzemploj elektitaj el liaj libroj tiu parto estis vera leciono de esperanto, centrigita sur tio, kio precipe karakterizas la verkaron de Claude Piron, tio estas la eksterordinara forto de lia krekapablo. Tiun spacon Claude Piron esploris probable pli profunde ol ĉiu alia, kiel la partoprenantoj al la kunsido povis konstati analizante perlojn kolektitajn de Anita Altherr.

Ŝajnas, ke la vortkreado por esprimi plej precize la pensojn estis por li vera kaj konstanta plezuro.

La vespero finiĝis do en atmosfero de plentuziasmo, kiu certe estus plaĉinta al Claude.

Alia elvoktago estos dediĉita al li kaj pri ĝi mi raportos aliffoje. Ĝi centriĝos sur la libro *Le Défi des Langues* kun muziko, io kio ankaŭ apartenas plene al la esperanta mondo de Claude Piron.

Markus Sanz

En la Internacia Lernejo

Sinjinoro Dova Dimbrovsi, instruistino en la Internacia Lernejo de Ĝenevo, invitis la ĝenevajn esperantistojn Stefano Keller, Georgette Friedly kaj Charmian Common, reprezentantoj de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, por prezenti esperanton al siaj gelernantoj okaze de la celebrado de la centjariĝo de unu el la

domoj de tiu ampleksa lernejo *La Châtaigneraie*. La koncertan vendredon 20-an de marto ankaŭ festiĝis la unua tago de la Semajno de la francparolantaro.



Stefano Keller franclingve kaj Charmian Common en la angla unue raportis pri esperanto mem, plaĉa filmeto poste montris kiel homoj renkontiĝas en Universalaj Kongresoj kaj aŭdigis muzik-grupojn.



La lernantoj estis instigitaj tuj praktiki la lingvon per ekzercetoj, kiujn ili aprezis. Rapide ili komprenis la diferencon inter "knabo" kaj "knabino" kaj similaĵojn.



Dum la 45 minutoj disponeblaj ilia

atento estis impresiga, kaj kiam ili forlasis la klasejon, kvazaŭ svarmo de lokustoj ili entuziasme forprenis ĉiujn dokumentojn disponeblajn.

Ĉe la LibroFairo 22 -26 aprilo



Nia Asocio EGR denove starigis belan budon ĉe la Ĝeneva LibroFairo, kvankam malgranda ĝi estis bone aranĝita, kun riĉa informilaro - afiŝoj, broŝuroj, libroj kaj ludo ! Ni denove faris traduk-ekzercon, sed ĉi-jare la frazo estis iom pli malfacila : *"Hodiaŭ mi iros al la urbo por aĉeti vestaĵojn. Mi havas nenion por surmeti."* Ni kolektis malpli da lingvoj ĉi-jare (19), sed tamen kelkaj estis tre interesaj, ekzemple literatura araba belege skribita, kaj dialekto de Nendaz-valo, kiun nia vizitanto enliterumis, ĉar li diris, ke ĝi baldaŭ malaperos kaj ke li volas konservi ĝin : *"Ouey aouaré ĝn vĉa po ataetĉa de j'halon. En ôô pa mĉrin a me mettre."* Ĉiam estas kontentige, kiam oni igas ilin legi la tekston, kaj ili komprenas ĝin post iom da pripensado.

Ni ne havis amasegon da vizitantoj, sed ili konstante fluetis preter nia budo kaj ricevis multajn informfoliojn. Ĉi-jare ili ŝajne venis ĉe ni

cele al informiĝo pri la kursoj, ili jam estis decidantaj eklerni esperanton. Virino estis ravita malkovri Asterikson en esperanto! Ni estas feliĉaj povi kunligi homojn de diversaj urbetoj en apuda Francio - Albertville, Lons-le-Saulnier, Les Houches, St Claude. Tiel estas nia rolo, ĉu ne?

La ĵaŭdon okazis debato pri esperanto: Roberto Frey klarigis kiel esperanto facile lerneblas ankaŭ por ĉinoj - li vizitis Ĉinion kaj lernis iom da mandareno. Li citis kiel ekzemplon la vorton "ekster-land-ano" kaj diris la samon en la mandarena demonstrante, ke la strukturo de la vorto estas precize la sama en ambaŭ lingvoj.

La Foiro estis plena je amuzaĵoj - ekzemple, la budo de minilibroj - kiu furoris! la libretoj mezuris 3x2 cm kaj enhavis verajn tekstojn, eĉ troviĝis vortareto franca-esperanta!

Mi dankas al niaj kuraĝaj deĵorantoj, dank' al kiuj ni almenaŭ povis gustumi kelkajn frandaĵojn de la Foiro - kaj apartan dankon al Jean-Loup Gaudin, kiu ĉiam helpas nin konstrui kaj malkonstrui nian budon.

Charmian Common & Marie Zoller

Tutmonda marŝado por paco kaj senperforto

Tiu evento komenciĝos en Lausanne (Chailly) sabate la 7an de novembro. Estos kunvenoj, prelegoj, diskutoj. Verŝajne Mireille Grosjean prelegos pri pacedukado. Ŝi estas en kontakto kun la orgaizantoj. Poste okazos la vera marŝo dimanĉe la 8an kaj lunde 9an en Ĝenevo. Informoj ĉe:

www.marchemondialepouurlapaix.ch

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

ccp 10-26785-8

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20.00.

Komitato: Prezidanto: David Bühlmann

Tel.: 021 624 36 38; Vicprezidanto:

Stéphanie Strappazon 079 415 33 16;

Sekretario: Francisko Randin 076 411 14

55; Kasisto: Sonia Daubercies 079 649 88

86.

Venontaj kunvenoj

Septembre 7: Programo decidota.

Oktobre 5: Programo decidota.

Novembre 2: Venu kun viaj demandoj kaj lingvaj problemoj, ni provos respondi al vi. Venu kun viaj malkovraĵoj, lingvaj kuriozaĵoj, vi partigos ilin kun ni.

Decembre 12 (sabate): Zamenhofa Festo.

2010 Januare 4: Progr. decidota.

Februare 1: Ĝenerala Asembleo.

Marte 1: Programo decidota.

Propagando je sabato sur la foira-placo La Palud de la 9a ĝis la 12a horo.

Septembre 5 kaj 19.

Babilada rondo je vendredo ĉe François Randin

Septembre 11

Oktobre 9 kaj 23

Novembre 13 kaj 27

Decembre 4.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Bären, Flecken 11, Rothenburg.
Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50
Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Septembre 2 (merkredo) ĉe Bellini :
14.00-16.00 : **Konversacia rondo**
kun Sonja Brun.

Oktobre 7 (merkredo) ĉe Rey :
14.00 : **Paroliga leciono** kun Paul Scherer,
14.30: **William Auld kaj La infana raso** kun Sonja Brun.

Novembre 4 (merkredo) ĉe Bellini :
14.00-16.00 : **Konversacia rondo**
kun Sonja Brun.

Decembre 2 (merkredo) ĉe Rey :
14.00 : Zamenhofologio kaj pretigo de la programo 2010 kun Paul Scherer.

2010 Januare 6 (merkredo) ĉe Bellini :
14.00-16.00 : **Konversacia rondo** kun Sonja Brun.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientvislando)

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder,
Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj
Wolfram Fischerm Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere

inter la sepa kaj la naŭa en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Septembre 2 : Impresoj kaj travivaĵoj de la Universala Kongreso en Bjalistoko. (Ĉekomence rakonta rondo.)

Oktobre : (Neniu renkontiĝo.)

Novembre 5 : Gastprelego: Kiel gasto en Benino, Koreo kaj Japanio (demandoj kaj respondoj). (Ĉekomence rakonta rondo.)

Decembre 2 : Fonduvespero kun poemoj, rakontoj, kantoj.

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum oficejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1

<http://esperanto.ch/zuriko>.

La kunvenoj okazas en Centro "Karl des Grosse, Kirchgasse 14, 8001 Zürich.

Venontaj kunvenoj

Septembre 26 (sabato) 19.00-22.00. Publika evento pri la Eŭropa Tago de la Lingvoj.

Decembre 11 (vendredon) : Zamenhofa festo kun aperitivo kaj manĝaĵoj.

Renkontiĝoj regulaj

ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en la hejmo de Michael Roesser, Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la 20.30 (rekte apud la haltejo "Rössli-

strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10 minutoj de la ĉefa stacidomo).

Venontaj jaŭdoj :

27-an de agosto

24-an de septembro.

Raportoj

La kunveno de la 8-a de majo estis tre sukcesa. Ni ĝojas konstati, ke regas nova vivo en nia zurika klubo. Kun Michael Roesser kaj Paolo Fernandez kaj ties vivpartnerinoj aliĝis al nia klubo du aktivaj junaj paroj.

Radio elsendoj ĉe Radio-Lora

La 9-an de majo en la hispanlingva programo de Radio Lora estis elsendita longa raporto pri la kunveno kaj la aktiveco de nia klubo de unu el niaj novaj membroj, kiu faras la hispanlingvajn elsendojn de la radio.

La 17-an de julio ĉe Radio-Lora okazis alia elsendo. Dietrich Weidmann intervjuis la membrojn de la Esperanto-Societo kaj gvidis rapidan kurson, kiun partoprenis deko da gastoj. Linda Weidmann kaj Sandra Fernandez kantis, Cyril kaj Dieter Rooke diris poemojn, Martin Meyer prezentis sian panalotusfluton kaj poste dum la tuta posttagmezo aŭdiĝis muzikaĵoj en esperanto. Eblas reaŭdi tiujn elsendojn sub www.lora.ch serĉante la koncernajn programojn.

Informoj pri la aktuala programo de Esperanto-Societo Zuriko troviĝas en la reto sub:

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht

zuriko@esperanto.ch /

<http://esperanto.ch/zuriko>


Morto

La 21-an de aprilo 2009 forpasis nia ŝatata honora membro sinjorino

Alice Kessler.

-oOo-

Kelkaj bildoj




Fotis Nancy Fontannaz

Mireille Grosjean kun siaj nepoj Romain kaj Samuel dum sia prelego pri sia vojaĝa restado en Japanio.



Fotis Mireille Grosjean

La deputito Alain Bringolf informiĝanta la 11-an de decembro 2007 pri esperanto en CDELI antaŭ ol deponi mocion favore al esperanto en la Granda Konsilantaro de la neŭŝatela ŝtato.



Kongresen

Dek-du tagoj survoje al Roterdamo per biciklo Luc Allemand

Daŭriga raporto

1a parto en *SES informas* 2008-4 : Pretiĝo kaj foriro la 6an de julio 2008.

2a parto en *SES informas* 2009-1 : 2a, 3a kaj 4a tagoj.

3a parto en *SES informas* 2009-2 : 5-a, 6-a, 7-a, 8-a kaj 9-a tagoj.



En Roterdamo Luc Allemand (dua dekstre) kun junaj kongresanoj el 9 landoj

Mardon 15-an de julio: 10-a tago


Post apenaŭ kelkaj metroj mi revenas reen: la antaŭa pneŭmatiko platas. Kriss pruntedonas pumpilon pli efikan ol mia eta. Verŝajne

taŭgas, la aero ne reeliras, almenaŭ ne rapide.

Ĝis Antverpeno mi hodiaŭ daŭre laŭiras kanalojn. Tiel mi ne riskos perdiĝi kaj la biciklovojo agrablas, kvankam ĝi iom monotonas. Nur

kelkfoje la vojeto direktiĝas al la alia kanalflanko kaj tiam necesas transiri sur kluzo. Dum horoj mi veturas inter akvo kaj arbaro el kverkoj kaj

betuloj. Vento blovas kontraŭ mi. La orientdirekta iro tra Ĵuraso de la unua tago refariĝas nun alidirekta.



Kanaloj en Belgio

Iam dum la tago mi devas repumpi la pneŭmatikon, ĉar aero tamen malrapide eliras tra verŝajne tute eta truo. Sed mi riparos ĝin, kiam mi estos alveninta, atendente tiun momenton la pumpado sufiĉas.

Preskaŭ neniam domo videblas el tiu vojo. Tamen restoracio staras apud la kanalo. Mi haltas, manĝas kukon surterase kaj plenigas mian akvobotelon.

Dek-kvinon da kilometroj antaŭ Antverpeno mi forlasas la kanalon por iri al la urbego pli rekte.

Kvaronhoron antaŭ la sepa mi alvenas ĉe Ite Houmet. Ankaŭ ŝiaj gefiloj parolas esperanton, sed la 15-jaraĝa filino ne estas tre parolema, krom pri sia kato !

Dum la vespermanĝo mi diskutas kun Ite. De ĉi-tie mi bezonas nur unu tagon por atingi Roterdamon kaj morgaŭ estos la 16-a de julio kaj la kongreso komenciĝos nur la sabaton 19-an. Kion mi faros dum du plenaj tagoj en Roterdamo? Ite do proponas, ke mi restu unu tagon en

Antverpeno. Tiel mi povos viziti la urbon kaj vidi ŝiajn familianojn, kiuj ankaŭ estas esperantistoj. Kia bona ideo, kaj kia ŝanco por mi !

Merkredon 16-an de julio: 11-a tago



Ŝildo de la esperanto-centro en Antverpeno

Esperanto estas ĉi-tie familia afero de almenaŭ tri generacioj. La kuzo de Ite havas du filinojn, Melinde kaj Karlijn, kiuj tre ŝatas nian lingvon kaj havas proksimume mian aĝon. Melinde vizitigas al mi la urbon, montras al mi la vidindaĵojn : interalie la esperanto-centron kaj ties

eldonejon. Ni manĝas kune en kebabejo kaj babiladas.

Fine de la posttagmezo mi trankvile riparas mian biciklotubon.

Por la vespermanĝo venas ankaŭ aliaj esperantistaj gastoj el Hispanio, kiuj ankaŭ iros al la kongreso. Tiel jam estas internacia esperantista vespero ! Regas bona etoso.

Ĵaŭdon 17-an de julio: 12-a tago

Hieraŭ vespere ni rigardis per la reto mapon por biciklantoj en Belgio. Je ĉiu kruciĝo estas numero kaj tiuj numeroj troviĝas ankaŭ en la realo. Mi do skribis la numerojn, tra kiuj mi devos pasi kaj nun, sekvante ilin atente mi veturas pli kaj pli norden kaj transiras la belg-nederlandan landlimon.

En Nederlando ne retroviĝas tiuj numeroj, sed la vojo ne komplikas kaj baldaŭ mi eĉ retrovas la samajn ŝildojn, kiel en Germanio, kun nomoj de la vilaĝoj kaj urboj. La nomo de Roterdamo aperas sur tiuj biciklaj ŝildoj.

Laŭ mia mapo mi tre baldaŭ retrovos la riveregon Rejno, aŭ pli precize larĝan parton de ĝia delto. Mi ne ankoraŭ vidas ĝin, sed sentas,

ke mi tute alproksimiĝas, ĉar la pejzaĝo fariĝas pli kaj pli marĉa kaj lageta, fakte ĉarma.



Pejzaĝo lageta kaj marĉa

Kaj finfine en tiu plata kamparo alsupras la biciklovojo al ponto, kie kuŝas ankaŭ aŭtoŝoseo kaj fervojo. Tie aperas nekredebla spektaklo. Rejno ne plu ŝajnas riverego, sed lago, aŭ eĉ marbrako.

Du longaj sinsekvaj pontoj transiras du partojn de la delto. Sub la unua verŝajne troviĝas kluzoj, grandaj kluzoj kun insuloj inter ili. Ventego blovas same kiel ĉe maro, kaj ponttrafika bruego surdigas. Tamen mi haltas kaj miras. Kia ŝanĝo kompare al la kamparo, en kiu mi estis ĵus antaŭ kelkaj minutoj !




Sur la rejna delto

Unu aŭ du horojn poste mi malkovras alian manieron transiri alian delteron, almenaŭ por biciklantoj.

La unuan fojon estis super la akvo, ĉi-foje estas sub la akvo.

Efektive la bicikla ŝildo indikanta Roterdamon montras enirejon, kie troviĝas movŝtuparo, kiu malsuprenigas nin al tunelo.

Silentas. Nur bicikloj veturas ĉi-sube. Tio ŝajnas al mi iom sciencfikcia.



Tunele sub la rejna delto

Biciklante tra Eŭropo mi rimarkis ion interesan : Ekzistas tri malsimilaj specoj da biciklantoj. La promenantoj aŭ labor-irantoj, kiuj veturas ĝenerale sufiĉe trankvile, la sportistoj, kiuj veturas tre rapide, kaj la vojaĝantoj kiel mi. La unuajn mi preterpasas, la duaj preterpasas min, kaj kun la triaj ni veturas pli-malpli samrapide.

Proksimume je la 19-a horo mi atingas la celon de mia vojaĝo. Ekpluventas, sed tion mi preskaŭ ne rimarkas pro emocio. Dek-du tagojn mi vojaĝis ; per dek etapoj mi veturis, mi vidis tiom da urboj, da vilaĝoj, da pejzaĝoj, kaj nun tio finiĝas ! La ideo, ke mi restos nun en la sama urbo dum unu semajno, tio ŝajnas al mi stranga.

Kaj jen Roterdamo ! kia moderna urbo ! Altaj vitraj kaj marmoraj domoj kaj la ponto *Erasmus* pensigas min al la grandaj usonaj urboj.



La Ponto Erasmus

Mi alvenas tra ĉefa strato, tra la fama ponto, preter la kongresejo kaj mi serĉas la amasloĝejon, kie mi dormos dum la kongreso. Ĝi nomiĝas *Mafkkees*. Malbela domego proksime de la stacidomo.

Junuloj ludas sub la ekstera ŝtuparo, ili parolas angle kune. Unu el ili parolas france kaj diras, ke mi povas lasi mian bicikon tie. Mi do lasas ĝin, sed tamen ne tute kviete, kaj eniras.

Mi alvenas en kafejon. Iu alparolas min en la angla lingvo. «*Kial angle ?*, mi pensas, *ĉi tie devus esti nederlande !*» Sed almenaŭ tiel mi iomete komprenas kaj kvankam mi ne ŝatas paroli la anglan kun iu, kies nacia lingvo ne estas la angla, mi rememorigas, kion mi lernis en la lernejo kaj pli-malpli facile respondas en la sama lingvo dirante, ke mi volas dormi ĉi tie, kaj ke mi ŝatus plej rapide meti mian biciklon en sekuran lokon.

Fakte mi aŭdis, ke multegaj bicikloj estas ŝtelataj en Nederlando, ĉefe en la grandaj urboj. Kaj plie la bicikloj, kiujn mi vidis en la urbo, verŝajne estas malpli kostaj ol la mia, kaj iliaj ŝlosaĵoj estas pli dikaj ol la mia. Tial mi lasos ĝin sekure en

la garaĝo de Mafkees dum la tuta semajno kaj ekde nun iros piede.

Juna triopo babilas ĉe la star-trinkejo. Ili estas veraj angloj, do mi senkulpe iom pli rememorigas miajn lernitaĵojn kaj babilas kun ili. Kiam mi klarigas, kial mi estas ĉi-tie, ili diras, ke ili vidis maljunan virinon, kiu ankaŭ parolas esperanton. Ĝojvigle mi petas al ili, ke ili montru ŝin al mi, kiam ŝi venos. Atendante ni teumas.

Jen ŝi ! Nun ŝi estas akompanata de junulo. Mi ekstaras kaj alparolas ilin : « *Ĉu vi parolas en esperanto ?* » - « *Jes !* » ambaŭ respondas. Ŝi estas rumanino kaj li venas el San Salvador (Sud-Ameriko). En la vespero venas ankaŭ ĉina esperantisto.

Lastaj vortoj

Du tagojn antaŭ la komenco de la Universala Kongreso jam kvar esperantistoj el kvar landoj troviĝis en Roterdamo. Morgaŭ alvenos ankoraŭ multaj aliaj en la amasloĝejon kaj dum la kongreso ne plu eblos konatiĝi kun ĉiuj. Ni estas proksimume mil-ok-cent el sep-dektri landoj. Por mi, kiu estas unuafoje partoprenanto, estas mirinde vidi tiom da esperantistoj ! Mi feliĉas.

Dimanĉon matene okazas la solena malfermo kaj kiel interkonsentite kun Mireille Grosjean mi estas la salutanto el Svislando. Landaj salutantoj havas po rezervitan sidlokon. Mi sidas inter togolandano kaj vjetnamino. Ili havas belajn tradiciajn kostumojn.

Jen kion mi diras, kiam miavice mi iras sur la podion :

« *Bonjour, Guten Tag, Bongiorno* (la prezidanto proponis, ke ni diru "bonan tagon" nacilingve). *Post ĉio, kion mi travivis dum la du lastaj semajnoj, mi povas aserti, kiel diris Zamenhof, ke homeco estas multe pli grava ol landlimoj. Mi do salutas vin nome de Svislando, sed fakte mi ofte sentas min pli homo ol nur sviso. Bonan kongreson !* »

Mi ne rakontos la tutan kongreson, ĉar tiu-ĉi raporto temas pri mia vojaĝo kaj ne pri la kongreso. Plej gravas, ke mi alvenis. Tiel povas finiĝi mia rakonto. Estis mirinda travivaĵo, kaj alia bonega semajno komenciĝas nun.

Tamen mi aldonu, ke dum la kongreso mi travivis tre agrablajn renkontojn kaj havis bonan tempon kun pluraj junuloj, aldone al la kongresa programo. Interalie kun iu...

Post la kongreso, post emociaj adiaŭoj kaj « *espereble ĝis venontjare !* » restas grupeto en la amasloĝejo, kiu trafos trajnon aŭ aviadilon morgaŭ. Ĉiuj aliaj jam foriris. Kvieto post semajna festego !

Tamen ni lastfoje festetu, iom pli intime piknikante en la kafejo. Tri rusinoj alportis teon. Ĉeestas ankaŭ germano, franca paro, iranino kaj mi. Ni havas panon, sekan viandon, fiŝetojn..., preskaŭ ĉiuj alportis ion. Mi ankaŭ metas sur la tablon la reston de la fromaĝo, kiun mi aĉetis por miaj piknikoj antaŭ pli ol unu semajno. Bona etoso regas kaj igas tiun lastan vesperon neforgesebla.

-oOo-

Redaktas: Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach,
rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Feria legaĵo

La Nica Literatura Revuo (NLR) estis grava kultura kaj literatura periodaĵo en Esperanto aperinta ĉiun duan monaton inter 1955 kaj 1962 en Choisy-le-Roi (Francio). Entute aperis 42 numeroj kun sume 1680 malgrandformataj paĝoj en redakto de Gaston Waringhien. La tuta kolekto estas legebla rete: http://eo.wikipedia.org/wiki/Nica_Literatura_Revuo.

“Kiel mi alkudris butonon al mia pantaloneo” estas humuraĵo de Jaroslav Hašek elĉeĥigita de Miloš Lukaš kaj aperis en la numero 4/1, paĝoj 27-30.

La plej ĝena afero, kiu povas la homon trafi, estas, kiam li ekrimarkas, ke lia vesto vidigas gravajn mankojn. En certa okazo li eĉ ne povas aperi en la socio, ĉar la socio ne faras diferencon inter maljuna fraŭlo kaj edziĝinto, kaj postulas de ambaŭ certan dozon da deco. Ne havi en ordo la pantalonbutonojn vekas ĉe multaj antaŭjuĝuloj ardan flamon da indigno. La socio ne prijuĝas tiun ĉi aferon objektivite kaj studas, nek laŭ la vidopunkto psikologia nek laŭ la praktika, la veran aferstaton. Ĝi forgesas, ke maljuna fraŭlo povas esti ankaŭ tre ĉasta homo, kiu ne kuraĝus alporti senbutonan pantalonon al la edzino de sia edziĝinta amiko kun peto, ke ŝi bonvolu meti ĉion en harmonian kompletecon, atestantan pri abso-

luta ordo. Kaj se mi turnus min kun simila peto kaj kun mia pantaloneo al la fraŭla filino de mia loĝejmastrino, mi ne scias, ĉu mi ne vekus en la delikata knabina animo ankaŭ ne malmulte da malŝato al mia persono, kiu malŝato ja estus tute prava.

Restas do al maljuna fraŭlo, se li volas sian bonan famon gardi, nenio alia, ol ke li mem alkudru butonon al sia pantaloneo.

Se iu kontraŭdiras, ke li povis turni sin kun tiu ĉi delikata problemo al la tajloro, kiu kudris por li la pantalonon ja ankaŭ neniu el la ĉi-maniere konjektantaj personoj juĝas ĝuste, ĉar, se mi venus kaj dirus al mia tajloro: “Jen sur mia pantaloneo mankas butono tie kaj tie, bonvolu ĝin alkudri”, tiam mi nepre elmetus min ankaŭ al

mokado, ĉar alkudri butonon ŝajnas esti afero tute facila same al tajlora fakulo kiel ankaŭ al la tuta vasta publiko. Certe poste miregus ĉiu, ke tajloro devis al ies pantalono alkudri butonon. Tio signifus, ke en ĉies okuloj tia maljuna fraŭlo aperas kiel sentaŭgulo, kiel homo eldoritita kaj malhardita, ŝvelfiera idioto kaj simile.

Pro tiuj ĉi motivoj la butonon al mia pantalono estis alkudranta mi mem.

Komence mi la forŝiriĝintan butonon anstataŭigis per pinglo. Foje en tramvagono tamen la pinglo enpenetris el la ŝtofo en mian korpon, kaj tial mi decidis, ke la butonon mi devas alkudri, kaj ne simple alpingli.

Mi konfesas tute cinike, ke komence, kiam mi ekrimarkis la perdon de tiu butono, la afero impresis min absolute neniel drame. Nur en la nokto, rememorinte la diversajn rigardojn, kiuj min sekvis dum la tuta vespero en la kafejo kaj de kiuj mi ne sukcesis min savi eĉ post kiam mi butonumis mian jakon, mi faris la decidon, ke mi tie alpinglos novan butonon, kiun mi detranĉis de mia veŝto. Se la veŝto malhavas unu butonon, la afero ne estas tiel malbona, kiel se oni sentas gravan perdon de unu butono pantalona. La veŝto tiam aspektas, kvazaŭ ĝi estus neglekte butonumita, kio estas ja kutima, ĉe maljunaj fraŭloj, kiel mi scias laŭ mia propra sperto. Tamen, finfine, la ĉirkaŭaĵon tio ĉi ne impresas ofende. Tute alie, kompreneble,

statas la afero, se ĝi koncernas ĝuste tiun vestoparton, kiun mi menciis.

Pro la diritaj motivoj mi preparis min por alkudri la butonon. Mi memoras, ke dum la tuta tago mi estis iel emociita, kaj ke tiu emocio pliiĝis, ju pli multe mi pripensis la aferon. Demandi, kiel oni alkudras butonon, mi ne volis, ĉar mi ne volis esti rigardata kiel malsaĝulo, kiu mi, se lojale tion konfesi, ĉiokaze ja estis.

Mia unua devo, kiun mi konsideris necesa, estis viziti la muzean legejon, pruntepreni tie la enciklopedion, nome la literon A, kaj serĉi la gvidvorton “alkudrado”.

Mi protestas nun kontraŭ la opinio, ke nia enciklopedio estas kompleta. Pri la alkudrado de butonoj oni trovas en ĝi absolute nenion sub la litero A, sub la gvidvorto “alkudrado de butonoj”. Tiu gvidvorto tie tute mankas! Sub la litero B mi trovis ja la gvidvorton “butono”, sed jen kion mi legis: “Butono estas peceto, per kiu du partoj de vesto kunteniĝas. La butonojn oni alfiksas per kudrado. La antikvaj egiptoj jam konis butonojn, dum la grekoj kaj romanoj butonojn ne konis. Butonoj aperis en Bohemujo samtempe kun la alveno de kristanismo.”

Mi do serĉis sub la gvidvorto “kristanismo” ian mencion pri butonoj, sed ĝi tie ne troviĝis. Se mi almenaŭ trovus, kiel la antikvaj egiptoj alkudris butonojn! Jen la gvidvorto “Egiptujo”. “En Egiptujo”, mi legas en la volumo E, “en

la manojn de la mortintaj pastroj metis la pastrinoj de Rao orajn butonojn antaŭ la entombigo.” – Sed kiel ili la butonojn alkudris, tio ne estis klarigita.

Mi devis do havi konfidon al mia propra kombinkapablo. Mi elrezonis, ke plej bone taŭgas la sistemo grada. Procedi sisteme! Mi pririgardis do la butonojn. Mi trovis, ke butono havas en si kvar truetojn.

Komence estis por mi mistero, kian celon ili havas, sed ekzamenante poste, kiel la truetoj povas influi la tutan aferon, mi eltrovis, ke verŝajne tra ili traigŝas fadeno, kiu konjekteble estas tra la truetoj transportata per ileto metia, nome per kudrilo. Kaj la kudrilo, kiel min instruis la enciklopedio, estas nenio alia ol certa speco de ŝtala levilo, kaj, diference de la porkido, ĝi havas nur unu oreton⁽¹⁾. Mi havas du. Tra tiu ĉi truo, kiel mi konstatis, oni traŝovas fadenon, kaj per movo, kvazaŭ oni volus ion stangolevi, oni supozeble surfadenigas la butonon kaj iel celkonforme manipulante la kudrilon, trapikas la pantalonon.

Mia fantazio aktivis tre vigle. Ĉar mi aŭdis, ke ŝtalo estas rompiĝema, mi aĉetis grocon da kudriloj. Krome dekduon da diversaj bobenoj kun fadenoj, plejparte nigraj. Blankajn fadenojn mi aĉetis, por ke mi povu, se ne montriĝus konvenaj la nigraj, turni min al blankaj. Mi disponigis al mi ankaŭ brunajn, kiujn mi volis uzi nur en

ekstrema okazo, se miskonvenus same la blankaj kiel la nigraj.

En la butikoj, kie mi aĉetis ilin, oni demandis min, ĉu mi deziras ankaŭ fingringon. Mi komprenis, ke temas pri io tre grava, kaj mi aĉetis dudek fingringojn. Analoge mi juĝis, ke laŭ la signifo de l' vorto oni metas fingringon sur fingron. Kial kaj kiacele, tio estis por mi enigmo. Por tamen ne fari eraron, mi devis aĉeti dudekon da ili, ĉar sur la piedoj oni havas dek kaj sur la manoj ankaŭ dek fingringojn.

Marŝanta kun la aĉetitaj objektoj al mia hejmo, mi havis impreson, kvazaŭ mi estus sorĉisto. Hejme mi perfekte hejtis la fornaron kaj alportis tri botelojn da bona vino, kaj, fortiginte min per abunda vespermanĝo kaj vino, mi elserĉis la malfeliĉan pantalonon kaj vigle eklaboris. Ankoraŭ hodiaŭ mi rememoras, ke la lukto estis akra, furioza!

Matene oni trovis min kuŝanta surtere, ĉirkaŭvolvita per dek kvar mil metroj da diverskoloraj fadenoj, surhavanta nur la subveston. Mi estis dormanta sur ducent kudriloj, kaj la pantalonon oni trovis alkudrita al la kanapo; sur la piedkaj manfingroj mi havis dudek fingringojn kaj mia tibikarno estis alkudrita al la tapiŝo.

Kio restis al mi por fari? – Mi aĉetis novan pantalonon.

⁽¹⁾ Oni pardonu tiun ĉi idiomajon; la slavo nomas la kudriltruon “orel(et)o”. (Rimarko de la tradukisto.)

Svislando eniris recesion

(rs) Laŭ oficialaj komunikoj Svislando eniris ekonomian recesion en la monato marto 2009. La prognozoj de la Nacia Banko estas la plej pesimismaj, tiuj de la Ŝtata Ofico pri Ekonomio iom malpli, sed ĝi kongruas ankaŭ kun la prognozoj de la specialistoj pri ekonomia konjunkturo ĉe la Federacia Teknika Altlernejo en Zuriko. Oni ekzemple ĵus anoncis ke la eksportoj en la monato februaro malpliigis je -16% (prognozo por la tuta jaro -8%). Oni antaŭvidas malkreskon de la ekonomio en la jaro 2009 je $-2,2\%$, plimultiĝon de la senlaboruloj al $3,8\%$ de la laborantaro, en 2010 al $5,2\%$ (plej alta procentaĵo de post ekonomia krizo antaŭ 34 jaroj).

La nombro de senlaboruloj 15-ĝis 24-jaraj kreskis je $+29,2\%$ de februaro 2008 al februaro 2009, dum por la pliaĝuloj la procentaĵo estis $+0,7\%$. La recesio montriĝas en la karakteriza kresko de la reduktita labortempo. En decembro 2008 ĝi kreskis je $+87,5\%$ kompare kun la antaŭa monato. Trafitaĵas estas precipe firmaoj produktantaj por la industrio koneksa al aŭtoproduktado, la maŝin- kaj elektro-industrio kaj la metalurgio. La svisa ekonomio dependas je 40% de la eksportindustrio, do pro tiu dependeco la krizo estas ankaŭ sentebla en nia lando, kvan-

kam ankoraŭ malpli en la konstru-branĉo kaj la pomalgranda komerco.

La financa krizo tuŝas la grandajn bankojn, ekzemple UBS, de kiu la ŝtato transprenis 70 miliardojn da toksaj valorpaperoj kaj kiun ĝi subvenciis per 6 miliardoj (1 svisa franko = 0,75 eŭro). Post granda premo ĉefe de Usono kaj EU, Svislando kiel aliaj financaj centroj intencas estonte pli akurate kunlabori kun aliaj ŝtatoj se temas pri eksterlandaj klientoj kiuj fraŭdas impostojn en iliaj respektivaj loĝlandoj. Tio estas insultego al ĉiuj civitanoj kiuj pagas honeste siajn impostojn. Sed impostaj fraŭdoj okazas ne nur en Svislando, ankaŭ en Usono (ŝtato Delavaro) kaj Britio (Kanalinsuloj) eblas kaŝi monon per kreo de anonimaj fondaĵoj ("trustoj").

Ŝajnas ke la recesio en Svislando ne estis vere forta en 2008 kompare kun kelkaj regionoj de la mondo. Por la lasta kvaronjaro de 2008 la malaltiĝo de la malneta enlanda produkto de kelkaj regionoj estas (proksimumaj ciferoj):

Svislando: -2%

Eŭrozono: -6%

Usono: $-6,5\%$

Germanio: -8%

Japanio: -14%

Recikligo

(rs) Laŭ statistiko de la Federacia Ofico por la Medio, Svisio troviĝas en internacia komparo en la pinta grupo rilate recikligon. Por la vitro la kvoto estas je pli ol 95 procentoj, por la PET-boteloj je 76 procentoj, por papero kaj kartono je 77 procentoj. Malpli diligente oni kolektis uzitajn bateriojn (66 procentoj).

La recikligo de ruboj kaj forĵetaĵoj estas efika kaj mediokonforma. En la jaro 2007 proksimume la duono de la forĵetaĵoj recikligiĝis kaj la reston oni uzis por produktado de kurento kaj hejtado. La kolektado kaj bruligado de ruboj kostis averaĝe po 106 frankojn (70 eŭrojn) por loĝanto.

En 2007 estis en Svisio preskaŭ 19 milionoj tunoj da ruboj. La plej granda parto, 12 milionoj tunoj, venis de la konstruado, 1,2 milionoj tunoj estis specialaj ruboj kaj 5,46 milionoj tunoj konsistis el mastrumaj kaj metiejaj ruboj. De ambaŭ ĉi-lastaj 51 procentojn oni materie reutiligis kaj la reston oni bruligis en la 29 svisaj rubbruligaj instalaĵoj produktantaj energion. Tiaj instalaĵoj posedas specialajn filtrojn por purigi la fumojn.

En Svisio la komunumoj havas relative grandan individuan decidopovon rilate kolektadon kaj recikligon de ruboj kaj forĵetaĵoj, do la situacio ne estas unueca. En mia komunumo ekzemple oni pagas por mastruma rubosako laŭ volu-

meno kaj oni devas ekzemple apartigi la rubojn kaj forĵetaĵojn laŭ materioj: gazetoj, kartonoj, vitraj aŭ plastaj boteloj, ladskatoloj, mebloj, aparatoj ktp., kiuj estas aparte kolektitaj en difinitaj lokoj.

Por la unuopa mastrumo tio signifas ioman laboron, sed oni rapide alkutimiĝas al selektado de la forĵetaĵoj. La avantaĝo estas ke la regiona centralo por bruligo de ruboj devas pritrakti malpli grandan kvanton. Tiel la aero malpli poluiĝas.

En la lastaj jaroj la leĝoj kaj regularoj pri ruboj kaj forĵetaĵoj pliseverigiĝis. Estas malpermesate bruligi mastrumajn rubojn en hejma forno aŭ ĝin forlasi en la naturo kaj oni povas esti punata se oni tion faras. Okazas kontroloj de la koncerna ofico.

(Laŭ SDA/ATS kaj Swissinfo)


Ŝercoj

Usonano instruas al sviso: “Ni skribas ‘New York’ kaj prononcas ‘Njujork’.”

La sviso opinias: “Ni skribas ‘Pardonu, kion vi diris?’ kaj diras ‘Kion?’.”

Tri bubetoj, franco, germano kaj sviso, diskutas pri la demando de kie venas la beboj. La franco estas persvadita ke tio rilatas iel al erotiko, la germano kredas ke la cikonio alportas ilin, dum la sviso opinias: “Ekzakte mi tion ne scias, sed tre verŝajne ĉe ni tio estas malsama laŭ la diversaj kantonj.”

Glaĉero liberigas ekipaĵon de neolitika ĉasisto



Situo de la trapasejo Schnidejoch kaj la glaĉero sub la monto Wildhorn

(rs) Hazardo ebligis malkovron en la varmega jaro 2003 de la plej antikvaj objektoj iam trovitaj en la Alpoj (proksimume 4400 a.K.), do mil jarojn pli malnovaj ol la fama mumio Ötzi trovita sur glaĉero en la Dolomitoj.


La plej rekta vojo inter Sion (512 m) en la Rodana valo kaj Thun (562 m) en la svisa mezlanda ebenaĵo estis jam en antikvaj tempoj praktikata. Necesas alsupri ĝis pasejo je 2756 m (Schnidejoch) proksime de la glaĉero sub la monto Wildhorn. Marŝantino malkovris tie en 2003 pafarkon kun sagujo el betula ŝelo kaj sagojn ŝtonpintajn datitajn laŭ dendrokronologiaj studoj el la epoko de 2800 a.K. Ek de tiam la arkeo-

logia servo de la kantono Berno traserĉas ĉiujare la lokon. Dum kvin jaroj oni trovis jam 400 objektojn diversepokajn. Ebligis ĉi tiujn malkovrojn la fakto ke la glaĉero retiriĝas ĉiujare iom pli pro la varmiĝo de la klimato.

Oni scias ke la du urboj Sion kaj Thun estis jam en la neolitiko kaj la bronzaĝo gravaj centroj. Multaj malkovritaj funebraj monumentoj kaj ties enhavoj atestas pri tio. Post esploro per karbonodatada metodo eblas diri ke la objektoj originas el tri ĉefaj periodoj:

– La plej freŝdataj devenas el la jaroj 200 a.K. ĝis 970 p.K., ekzemple arĝenta fibulo kaj romiaj moneroj.

– Pinglo (23 cm) kun diskoforma kapo skulptita kaj ligiloj kiujn utiligis mulistoj por fiksi ŝarĝojn originas el la bronzepoko (2140 ĝis 1530 a.K.).



Pinglo (maldekstre) kaj sagujo el betula ŝelo.

– La plej antikvaj trovaĵoj datas el la neolitiko (pli precize de 3650 ĝis 2270 a.K.) kaj estas la plej interesaj: kompleta ekipaĵo de ĉasisto, sed ankaŭ leda peco de gamaŝo kaj pluraj vestpecoj, unu certe parto de mokaseno, kiu fiskiĝis per ligoj al la piedo.

– Per DNA-analizo la arkeologoj eksciis ke la ledo devenis de kapra raso origina el Grekio. La tanado estis tre efika kaj ne necesis konserviga traktado. La objekto la plej malnova estas ligna bovlopeco kun tenilo datanta je 4400 a.K.

La arkeologoj nun staras antaŭ la demando, ĉu la ekipaĵo de la ĉasisto estas perditaj objektoj, ĉu

li mem pereis samloke kaj la glaĉero povus iam liberigi la korpon konservitan de la glaĉero. Tamen ili supozas ke tio estas neverŝajna, ĉar la koncerna glacikampo iĝis ege malgranda kaj estis bone esplorita.

(Laŭ artikolo kaj bildoj el Le Temps, Ĝenevo 2008.08.22, paĝo 12.)




De supre: bovloanso, probabla aspekto de la mokaseno kaj ties ledaj restoj.

Ĉu vi scias ?...

... ke Camille Pissarro (1830-1903) havis ok infanojn ?

Jes, kompreneble vi scias tion... sed ĉu vi scias ke inter ili unu (la kvara, Ludovic Rodolphe, alinome Ludovic-Rodo) estis esperantisto ?



Portreto de Albert Einstein desegnita fare de Ludovic Rodo, kvara filo de la pentristo Camille Pissarro.

Li eĉ verkis originale en esperanto la broŝuron “Vivo de Pissarro” (Portugala eldona rondo, 1948, du ekzempleroj en CDELI). Temas pri ĉarma libreto en kiu li esprimas sian admiron al la patro kaj sian profundan komprenon de lia verko.

Li mem profesie ankaŭ fariĝis artisto (pentristo, gravuristo, skulptisto) sed restis nur mezkonata ĝis nun (ĝis tiu artikoleto en “SES informas”).

Kiel li havis la unuan kontakton kun esperanto ni ne scias – sed tio probable okazis en la kadro de la pacistaj kaj anarĥistaj medioj, kiujn li frekventis. Por tiuj rondoj li cetere tute malavare ilustris gazetojn kaj flugfoliojn. (Multaj ekzemploj videblaj en la reto.)


Esperanton li multe subtenis en la kadro de la esperantista laborista movado.

Li tute ne hontis pri sia esperantisteco nek pri Zamenhof.

En la Salono de la artistoj en Parizo en 1935 li prezentis buston de Zamenhof (kaj en la Salono de Rouen en 1934 pentritan portreton).

Li mortis en la jaro 1952 (naskiĝis en 1878).

Martine Schneller



Busto de Zamenhof, skulptita de Ludovic Rodo.

Elektronikaj libroj en la reto

(rs) Eblas elŝuti senkoste elektronikajn librojn interrete (pdf-dosierojn) el Ipernity, sed necesas enskribiĝi (devige estas nur la nomo, retadreso kaj la lando, sed ekzemple ne la foto) :

<http://www.ipernity.com/doc/deodaro/album/85640> (pli ol 400 titoloj).

<http://www.ipernity.com/doc/mike59/album/86911> (270 titoloj).

Kiam vi elektis la deziratan libron klaku sur “Ĉu pliaj informoj?”, poste sur “Elŝuti ĉi tiun dosieron” (ne atentu la erarigan averton “Tiu ĉi dosiero ne povas esti montrata rete.”). Por elŝuto kaj legado tamen legprogramo Acrobat Reader aŭ simila devas esti instalita en la programaro de via komputilo.

Loko ekster Ipernity estas: http://cindymckee.com/?page_id=11 (oni povas iri al cindymckee.com kaj klaki la ligilon “Librejo”: 352 titoloj). Tie la elŝutado estas ankoraŭ pli facila kaj rekta ol en Ipernity.

Jen ekzemplo de aktuala apero de libro kies aŭtoro rezignis pri enspezoj de la elektronika versio de sia libro:

“Marvirinstrato”, novelaro de Tim Westover

La aŭtoro de ĉi tiu libro en pdf-versio anoncas ke ĝi estas havebla sub la permesilo Creative Commons. Vi povas elŝuti la tutan kiel elektronikan libron de Ipernity aŭ de la retejo: <http://www.marvirinstrato.com>.

Marvirinstrato estas ankaŭ aĉetebla kiel papera libro per la libroservoj de UEA kaj Esperanto-USA. Tri noveloj en Marvirinstrato ricevis premiojn en la branĉo “Prozo” de la Belartaj Konkursoj de UEA (3-a premio, 2005; 2-a premio, 2006; 1-a premio, 2007). Aliaj ricevis premiojn de LIRO- kaj MUZO-konkursoj, kaj kelkaj eldoniĝis, i.a. en Beletra Almanako, Fonto, kaj Literatura Foiro.

Infanvilaĝo Pestalozzi

(rs) La sekvoj de la dua mondmilito kaj la mizero de la infanoj kaj orfoj post la milito kortuŝis la verkiston kaj filozofon Walter Robert Corti kaj li alvokis en la kulturrevuo *Du* en Aŭgusto 1944 per artikolo “Vilaĝo por suferantaj infanoj”, en kiu li proponis fondon de vilaĝo por milit-orfoj. La eĥo

estis granda kaj la Fondaĵo Infanvilaĝo Pestalozzi realiĝis en la jaro 1945. En 1946 komenciĝis la konstruo de la unuaj domoj. La komunumo Trogen en la kantono Appenzell (orienta Svislando) disponigis la necesan grundon. En 1960 venis la unuaj ekstereŭropaj infanoj, 20 tibetaj rifuĝintoj. Ĝis

1970 oni konstruis 25 domojn por doni hejmon al infanoj en mizero el la tuta mondo. La instruisto Arthur Bill gvidis la novan infanvilaĝon kun sia edzino Berta dum 25 jaroj (1947-1972). En 1982 fondiĝis la Eksterlanda helpo de la Fondaĵo Infanvilaĝo Pestalozzi.



Pedagogia koncepto

La pedagogia koncepto inspiriĝis de Johann Heinrich Pestalozzi (1746-1827, svisa pedagogo kaj socia reformisto, kiu aplikis siajn ideojn de instruigo por ĉiuj unue en orfejo) kaj resumiĝas per la devizo “Kun kapo, koro kaj mano” signifanta tutecan edukiĝon laŭ la individuaj kapabloj. Arthur Bill difinis la ĉefcelojn de la infanvilaĝo tiel: “1. Ĝi volas oferti hejmon al la forlasita infano en mizero, en kiu ĝi trovas familiosimilan protekton kaj ĉion necesan por harmonia evoluo. – 2. Ĝi volas esti loko, en kiu infanoj, junuloj kaj pedagogoj el diversaj landoj kaj kulturoj troviĝas por komunaj aktivecoj kaj kiu ebligas vivadon en ĝeneralhomeca popolkomunumo malgraŭ la baroj de lingvo, kredo kaj deveno.” En ĉiu domo vivis infanoj samoriginaj,

kiuj estis instruataj de edukisto de la sama lando kaj kulturo. Komunaj okazaĵoj aŭ konkuroj organiziĝis tiel ke la unuopaj grupoj konsistiĝis ĉiam el diversaj naciecoj. – En la unuaj dek jaroj la infanvilaĝo akceptis preskaŭ kvincent mil vizitantojn el la tuta mondo, inter aliaj internacie konataj personuloj. Intertempe okazis ŝanĝo kaj hodiaŭ la infanoj kunloĝas en la vilaĝo sed instruigas en la publikaj lernejoj de la regiono.

Vastiĝo al helpo surloka

En la jaro 1982 la koncepto vastiĝis al tutmonda helpo surloka kun partneraj organizaĵoj, kiuj efektivigas konstrulaborojn en evolulandoj, post naturaj katastrofoj aŭ militoj kaj subtenas la interkulturan komprenadon kaj pac-edukadon. La Fondaĵo Infanvilaĝo Pestalozzi metas la infanrajtojn kaj la kunagadon de infanoj kaj junuloj en la centron de sia laboro. La interkultura kunloĝado ebligas konkretajn kontaktojn por infanoj diversoriginaj.

Ekzistas staĝoj de interkultura preparo por ontaj metilernantoj. Interalie la Infanvilaĝo Pestalozzi invitas ankaŭ klasojn de svisaj lernantoj por staĝoj de interkultura kunvivado kaj naŭmonatan studperiodon de interkultura pedagogio por studentoj el diversaj mondpartoj.

Laŭ la modelo de la Infanvilaĝo Pestalozzi en Trogen estiĝis ankaŭ samtipaj vilaĝoj en Germanio (Wahlwies 1947), Aŭstrio (SOS-

Infanvilaĝoj fonditaj de Hermann Gmeiner en 1949) kaj Britio (Pestalozzi International Village, en Sedlescombe 1957).

(Informoj el Vikipedio kaj la retpaĝo de la Fondaĵo Infanvilaĝo Pestalozzi:

<http://www.pestalozzi.ch>)

Tri noveloj de Lusin



Lignogravuraĵo de Li Hua el "Noveloj de Lusin. Plena Kolekto". Pekino 1974.

(rs) Hazarde mi iam brokante akiris la libron "Noveloj de Lusin" kun belaj lignogravuraĵoj. Laŭdire la plej konata estas "La taglibro de frenezulo", en kiu efektive antropofagio estas la obsedo de junulo, kiu suferas pro manio de persekutiĝo. La timigaj halucinoj de ĉi tiu juna homo kredigas al li ke ĉiuj personoj renkontataj ŝajne volas mortigi kaj manĝi lin. Interalie oni povas trovi sekvan frazon: "Mia frato diris al mi, ke bona homo devas fortranĉi kaj kuiri pecon de sia karno por siaj malsanaj gepatroj." Vere tre stranga ideo pri respekto al siaj gepatroj! Tamen jam komence de la rakonto la aŭtoro ironie konstatas ke ĉi tiu frenezulo intertempe resaniĝis kaj eĉ povis kandidatiĝi por ŝtata ofico! Tiu kanibalismo estas simbolo por la sklerozigo de la ŝtata konfuceismo, kiu postulas submeton de

la individuo al la klasoj de nobeluloj kaj ŝtataj funkciuloj kvazaŭ la konfuceismo "manĝus siajn infanojn".

"Kong Jigi", alia novelo, estas la nomo de mizeriĝanta maljuna erudiciulo, kiu recitas konfuceismajn klasik-aĵojn, sed la junuloj ne plu komprenas liajn dirojn ĉar ili scias nur la modernan lingvon kaj primokas lin. Ankaŭ tio estas kritiko de la dekadencan konfuceismo.

"La Ĉefa Historio de A-Q" temas pri mizera kamparana tagulo, kiun la aŭtoro pentras en la unua parto havante malsimpatian karakteron. Li humile klinas la kapon antaŭ siaj mastroj ĝis la tago kiam li estas nejuste akuzata aparteni al revolucia movado. Antaŭ tribunalo oni devigas lin subskribi dokumenton. Ne sciante legi aŭ skribi li desegnas melonforman cirkon laŭ la instigoj de la juĝisto kaj per tio senscie akceptas la propran mortkondamnon. Ankaŭ en ĉi tiu novelo la (kontraŭ-)heroo A-Q simbolas la transiron de la ĉina imperio al la respubliko. Vera revolucio ne okazas. La malnovaj strukturoj restas, ĉar la konscio de la homoj ne ŝanĝiĝis.

Ĉi tiu lasta novelo estas konsiderata kiel majstroverko de la ĉina literaturo kaj tradukita en multajn lingvojn, sed fakte ĝi estas preskaŭ netradukebla pro la diferencoj inter la klasika kaj vulgara lingvoj miksitaj kaj kies nuancojn neĉino verŝajne ne povas ĝuste percepti. La maljusta akuzo memorigas min pri "La proceso" de Franz Kafka, en kiu sinjoro K. neniam vere ekscios pri kio li kulpas kaj kio estas la kaŭzo de lia kondamno.